

Pergazetaj rigardoj al orienta Eŭropo
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1992 januaro 23 kaj 25

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Hodiaŭ ni turnos niajn rigardojn al esperanto-gazetoj aperantaj en la orienteŭropaj landoj. Kun la falo de la komunismaj diktaturoj ankaŭ falis subvencioj, kiuj ekzemple ebligis la eldonon de esperanto-organoj, kiel "Budapeŝta Informilo". Tial tiuj subvenciitaj revuoj baldaŭ mortis, kaj naskiĝas novaj organoj malgraŭ financaj malfacilaĵoj. Ekzemple el Hungario ni ricevas la organon "Hungara Informilo" subtitolita "Informa gazeto pri Esperanto Movado." Tiu subtitolo kun siaj du gramatikaj eraroj, manko de la artikolo **la** kaj manko de dividostreko inter la vortoj esperanto kaj movado montras, ke nova homo zorgas pri la redaktado de tiu informilo, kaj ke lingve li ne atingas la nivelon de siaj antaŭuloj.

A.- La analizo de la ĉefartikolo de la novembra numero 1991-a de "Hungara Informilo" ebligis malkovri abundon da aliaj lingvaj malglataĵoj, kiujn oni ne devus trovi en esperanto-gazeto. Ekzemple mankas pronomoj:

Cl.- Ĉu okazos aŭ ne okazos?

A.- Devus esti: "Ĉu **ĝi** okazos aŭ ne okazos?" La uzo de la korelativoj kaj de la verb-finaĵoj estas ofte erara. Aŭdu tiun frazon:

Cl.- "Ĉu ni bezonus tion eblecon, prezentiĝi al Eŭropo, kien ni tre "sopiras" aliĝi."

A.- Li volis verŝajne skribi:

Cl.- "Ĉu ni bezonos tiun eblecon por prezentiĝi al Eŭropo, al kiu ni aliĝemas." Tio montras, ke kun la bankroto de la antaŭaj organoj retiriĝis lertaj redaktistoj, kaj ke nova generacio de ne tre kompetentaj bonvoluloj ekagis.

A.- Ĉio ŝanĝiĝas. Ankaŭ la statuto de la esperanto-asocioj. Mortas la ŝtat-organizaĵoj, kreiĝas novaj. Jen citaĵo el "Raporto pri la agado de Hungaria Esperanto-Asocio en la periodo 90/91":

Cl.- "Dum la pasintaj jaroj en la hungara socio okazis profundaj ŝanĝoj, kiuj influis ankaŭ la agadon de Hungara Esperanto-Asocio. Dank'al la malapero de mola diktaturo en Hungario esperantistoj povas agadi sen ŝtata kontrolo, formi siajn agadstrukturojn laŭ propraj interesoj. Ĝuste en la agadstrukturoj okazis la plej rimarkeblaj ŝanĝoj dum la pasintaj monatoj: fondiĝis jam pli ol 10 memstaraj esperanto-asocioj en Hungario, kiuj jam mem organizas la agadojn de esperantistoj en siaj sferoj. Samtempe komenciĝis ankaŭ la traktadoj inter ĉi tiuj asocioj pri la kunlaboro."

A.- Samajn travivaĵojn ekkonas ĉiuj orient-eŭropaj esperanto-movadoj. Komence de la jaro 1992-a ni diras niajn bondezirojn al tiuj samideanoj, kiuj devas ĉion reorganizi, alimaniere refunkciigi. En okcidenta Eŭropo ni ne ĉiam konscias pri la problemoj, kiujn alfrontas la esperantistoj en la eks-komunisma mondo.

Cl.- "Bulgara Esperantisto" konservis altan nivelon kaj eĉ estas pli belaspekta, ol antaŭ kelkaj jaroj. Kaj en la oktobra numero 1991-a Dimitar MUTUŜEV sin esprimas favore al tutbalkana kunlaboro. Ni citas lin:

A.- "Antaŭ kelke da tempo mi vidis sur blanka folio bone preparitan emblemon: verda stelo ĉirkaŭata ambaŭflanke de 3 manoj kaj surskribo "2-a Balkana Esperanto-Kongreso. Tio estas manoj de esperantistoj el ses Balkanaj landoj: Albanio, Bulgario, Greklando, Rumanio, Turkio kaj Jugoslavio. Ili zorgas pri defendo kaj prospero de esperantistaj movadoj en tiuj landoj, kies simbolo estas la verda stelo..."

Cl.- "Vere, daŭrigas Dimitar MUTUŜEV, la unua penso, kiu venis en mian kapon, estis: ĉu malnova ideo por Balkana federacio estas vigla kaj povas esti aktuala ankaŭ nuntempe? Kia devas esti nia preteco por defendo de tiu ideo? La respondojn mi deziras vidi ne laŭ la nunaj malfavoraj kondiĉoj, precipe en Jugoslavio, sed ĉe aliaj cirkonstancoj en la estonteco. Eble, post kiam la balkanaj landoj pli intime komercos inter si, kunlaboros en la diversaj sferoj - kultura, scienca, turisma, sportista ktp, la sentoj kaj la pensoj de la loĝantaro el tiuj landoj estos orientitaj al kunlaboro kaj bonaj najbaraj rilatoj. La oftaj kontaktoj forigos la problemon pri la ŝtatlimoj, pri la doganaj kontroloj, pri valideco de personaj vojaĝpasportoj ktp. Se venas pacaj tagoj, tiam la ideo pri balkana unueco trovos pli da adeptoj. Balkana regiono estos parto de Eŭropa Komunumo. Laŭ nia destino, la esperantistoj devas esti pioniroj de la balkana unueco."

A.- Ni ŝatus citi la tutan artikolon, kiu montras, ke la esperantistoj en orienta Eŭropo ne aliĝas al la naciismaj kaj eĉ rasismaj bataloj, kiuj dividas la homojn. Al superŝtataj agadoj ili restas fidelaj. Tion ni ne forgesu, kiam ni aŭdas la batal-kriojn de la naciistoj kaj konstatas la murdojn de la armeoj. Ni ne forgesu, ke en Jugoslavio multaj esperantistoj travivas suferigajn eventojn, kiuj kontraŭas ilian mondanisman idealon.

Cl.- Al la baltaj landoj ni ankaŭ turnu niajn rigardojn. La revuo "Litova Stelo", revuo de Litova Esperanto-Asocio estas belaspekta, lingve altnivela, enhave sufiĉe varia, kvankam ĉefe dediĉita al prilitivaj temoj. Ĉefcelo estas konigi Litovion al nelitovoj kaj por la litovoj daŭrigi la esperanto-aktivecojn, kiujn abrupte interrompis la soveta diktaturo en 1940.

A.- La rubriko "Iom da ŝercoj" alportas spicon al la tuto. Por konkludi nian raporton ni citu kelkajn el ili:

Cl.- Centra Komitato de Komunista Partio kaj Sekureca Servo decidis esplori, kiamaniere sekretaj donitaĵoj trafas al eksterlando. Ili organizis sekretan kunsidon, ŝlosis ĉiujn pordojn, ĉion kontrolis, ke ne estu kaŝitaj mikrofonoj, malpermesis iri eĉ al necesejo - kaj komencis la konsiliĝon. Post kelka tempo Kosigin petas:

- Mi bezonas al necesejo. Permesu!

Oni ne permesas:

- Eble vi transdonas la donitaĵojn?!

Post duonhoru li ree petas:

- Permesu, mi estas maljuna, mi ne povas toleri... A1 vi mem estos malbone, se mi ellasos en pantalonon...

Oni ne permesas. Subite - frapo al la pordo. La prezidanto demandas:

- Kiu?

Komandanto de Kremlo diras trans la pordo:

-BBC ĵus sciigis, ke vi ne permesas al Kosigin iri en necesejon. Tial ni alportis noktovazon.

A.- Al kies civitaneco apartenis Adamo kaj Eva?

- Sendube al civitaneco de Sovetunio: ili estis tute nudaj, havis por manĝi nur unu pomon, sed fanfaronis, ke ili loĝas en paradizo.

Cl.- Maljuna virino venis en Kremlon kaj demandis:

- Diru, kiu inventis komunismon - ĉu politikisto, ĉu sciencisto?

- Politikisto, - senŝancele respondis Kremlo.

- Domaĝe. Se sciencisto ĝin kreus, unuavice li ĝin elprovus je musoj.

A.- Venis homo al polikliniko kaj postulis:

- Mi bezonas kuraciston por okuloj kaj oreloj.

- Tian universalan kuraciston ni ne havas: orelojn kuracas laringologo, okulojn - okulisto.

- Sed mi bezonas unu kuraciston - saman por oreloj kaj okuloj!

- Do, kia estas tiu via malsano?

- La malsano estas kutima - mi aŭdas unu veron, sed vidas alian.

C.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND diras al siaj karaj geaŭdantoj: Ĝis reaŭdo !